- 12150. SFERO.** [San Francisco Esperanto-Regional Organization]. Regional bulletin for Northern California. San Francisco (CA,US), June 1973, 1 p. 36x22, presita en la angla. [7076]. Fonto: Bulteno de la Walla Walla Esperanto-Societo, okt. 1973, p. 2.
- 12151. SFERO Bulteno.** (San Francisco Esperanto-Regiona Organizo) (SFERO). San Francisco (CA,US), apr. 1990. [7077].
- 12152. SFERO Esperanto News.** (SFERO News Notes). Eld. Esperanto Information Center. Burlingame (US), ? Febr.-march-1973. [7078]. Fonto: Bulteno de la Walla Walla Esperanto-So-cieto, okt. 1973, p. 1.
- 12153. SFERO News Briefs.** Ie en Usono (CA, US). Sept. 1990. [9655]. Fonto: Esperanto-Klubo San Diego. Novajletero, sept. 1991, p. 2.
- 12154. Shakespeare in Esperanto, 1887-1965.** A Bibliography . Shakespeare en Esperanto, 1987-1996. Bibliografio kompilita, redaktita de d- ro. Humphrey Tonkin. London (GB),1966, 22 p. 30x15. Eld. Universala Esperanto-Asocio, Centro de Esploro kaj Dokumentado 13. Series D. [Serio Esperanta Literaturo. Section II. Tradukaj verkoj. English and/kaj Esperanto. Fon-to: Katalogo de la Esperanto-kolektaĵo de Károly Fajsz., Vol. 2. (5172).
- 12155. Sheffielda Esperantisto, La.** Woodseats (GB? US?), Sheffield (GB, US?), jan.? 1929 -? 4 p. 21x17, ciklostilita. Almenaŭ tri n-roj. Ŝajne aperas monate. Red. A.J. Allaway. [7079]. Fonto: Heroldo de Esperanto, n-ro 524, 1929/28, p. 3.
- 12156. Shizuoka Esperanto-Klubo.** Kluba organo. Shizuoka (JP), ?-2005 -2008 -? Fontoj: La Re-vuo Orienta, aŭg. 2005; Retletero de Tahira masako (2007), 26-a gazeto sur la sendita listo de japanaj E-gazetoj; Rete sendita gazetlisto de Hori Yasuo.
- 12157. Siana Korespondanto.** La siana registaro mallonga-tempe eldonis tiun ĉi Esperanto-gaze-ton. Bangkok/Krung Thep? (TH). Ĉ. 1950? Fonto: The British Esperantist, 1950 March/April, p. 138.
- 12158. Siana korespondo.** Multobligata Esperanto-bulteno demokrat-tendenca. En ĝi estas arti-koloj pri la politika ŝanĝo en Siano, la politika programo de la Siana Kompartio. Bangkok/Krung Thep (TH), 1948, A3. Sola nu- mero. Red. Liu Rizou. IEMW 703.334-E.Esp. [7081]. Fonto: Internacia Kulturo, 1948 nov.-dec. p. 30.
- 12159. Siana Esperantisto.** Esperanto-organo de Sian-a Esperanto-Asocio en Shensi provinco. Sian (CN), [antaŭ la ĉina-japana milito]. 1936?- 1937? La milito ĉesigis ĝin en 1937. [7082]. Fon-to: Voĉoj el Oriento. 1939 dec. p. 7.
- 12160. Siberia Esperantisto.** Organo de Siberia Komitato Esperanta? Tomsk (RU), 1918, 10 p. ci-klostilita. [7083]. Fontoj: Stojan p. 353; Takács (1095).
- 12161. Siberia Verda Stelo.** Militkaptiteja gazeto. [Krieggefangenenzeitung]. Nikolsk-Usurijsk (RU), 1919? A5. Red. s-roj Liebus kaj L. Dobay. IEMW 702.667-B.Esp. [7084].
- 12162. Sibirskaja Gazeta.** [Siberia Gazeto]. Ie en Ruslando (RU), 1993. N-ro 171 aperis en 1993. Ĉu temas pri «rubri- ka gazeto»? [9727].
- 12163. S.I.C.E.F. Organe Official de la Société Industrielle Commerciale Espérantiste de France.** Organo de la Societo Industria kaj Komerca Esperantista de Francujo. Paris (FR), julio 1911-1912? 8 + IV p. 21x14. Almenaŭ 2 n-roj. IEMW 703.401-B.Esp. [7085]. Fontoj: Esperanto (UEA), 5 Nov. 1911, p. 9 (31); Tutmonda Jarlibro Esperantista, 1912, p. 206; Stojan (3810), p. 347; Takács (1096).

- 12164. Sicilia Federacio Esperanta-Palermo.** Unua cirkulero kaj nomaro de la societanoj. Palermo (IT), 1905, 8 p. A4, manskribita, 32x22, multobligita. IEMW 703.768-D.Esp. [7086]. Fontoj: En Espero Katolika (jaro 1904/1905 junio/julio, n-ro 19. p. 71: «Sicilia Federacio Esperanta esperas ke multaj Esperantistoj abonos la revuon Sicilia Universitaria, kiu eldoniĝos duone en Esperanto se Esperantistaj legantoj estos sufiĉe multaj». Varbas abonontonj d-ro Vitangelo Nalli en Palermo, IT); Georg K. Davidov: Katalogo. ... p. 109.
- 12165. Sicilia Universitaria.** Palermo? (IT). Ĉu ĝi aperis? Fonto: Informoj pere de Ana Maria Molera el Espero Katolika, junio-julio 1904-1905, p. 71.
- 12166. Sidejo de Brazila Esperantista Ligilo.** Ie en Brazilo (BR), 1988. Fonto: Beko- Bulteno, 1988, n-ro 51, p. 9.
- 12167. Sidejo de Internacia Esperanto-Muzeo.** Wien? (AT), 1962, 6 p. 20x10. [7087].
- 12168. Siegfried Ziegler Verlag.** Dr. Katalogo. Eldonloko nekonata. Dec. 1954, 3 folioj, 30x21, multobligita. [7088].
- 12169. Signalo.** Membro-organo de Esperanto-Societo de Oulu. Kvaronjara revuo plejparte en Esperanto. Oulu (FI?), 1987-1989, 16 p. 21x15. La unuaj n-roj en 1989 (1-a kajero) aperis kune kun Cirkulero 3/89 de E.A.F. [Esperanto-Asocio de Finnlando]. La samo okazis kun ĝia speciala eldono (n.ro 5/1988). Red. Allan Mehtonen. [7089]. Fontoj: Cirkulero de EAF, 1988/5, p. 1; Reta informo de d-ro Jukka Pietiläinen (2008-02-03).
- 12170. Signalo de Esperantujo.** Eld. Klub Inteligencji Katolickiej. Tarnów (PL), Kraków (PL), 1975-1976. 5 n-roj. [7090].
- 12171. Silezia Ligo Esperantista (SILEO).** Schmideberg i. Rsgb. (DE), 1928-1932, A4, hektografita. Almenaŭ 24 n-roj. Red. Karl Zilscher. [7091].
- 12172. Silkeborg Esperanto-Förening.** Monataj informoj. Silkeborg (DK), 1958. Almenaŭ 5 n-roj. [8662]. Fonto: Mankolisto de IEMW, 1993, p. 99.
- 12173. Simbolo, La.** Symbol. Eld. Symbol Publisheing Co. Monata internacia gazeto. Bele presita literatura gazeto. Tacoma (WA,US), marto 1909- junio* 1911, 24-28 + IV p. 21x14, 28x18,5, presita, tute en Esperanto. Entute 14 kajeroj. IEMW 703.402-B.Esp.* GEBA (1881). [7092]. Fontoj: Lingvo Internacia, 1909/5, p. 283; La Revuo, Jan. 1910, p. 62 (kovrilpaĝo); Esperanto (UEA), 20 julio 1911, p. 10 (218); Stojan (3215), p. 312; Ta- kács (1097).
- 12174. Simpatija.** Mjesečna zbirka dopisa za izmjenu misli. Monata leterkolekto por interŝanĝi la pensojn. Virovitica (YU/HR). Januar 1941, 16 p. 22,5x15, presita. Ureduje (redaktas) J. Sevdîć, Tiskara Zlatko, Ĉukoviĉ (Virivitica). Izdovaĉ i. odgovorni urednik inĝ. Fr. Ĉervenka (Virovitica) en la serbokroata lingvo. Febr. 1941, 16 p. samformata, presita, parte en Esperanto. [4763]. Fonto: BAM.
- 12175. Simpligita Esperanto.** Cirkulero. «El Milwaukee oni dissendas amase tra la mondo cirkulerojn, per kiuj oni volas instigi la esperantistojn forigi ĉiujn supersignojn kaj anstataŭi ilin per aliaj literoj.» Milwaukee (WI, US), 1947? 1948? Fonto: La Ĝusta Vojo, Majo-Junio, 1948, p. 4.
- 12176. Simpozio.** Filozofia Revuo. Duonjara faka organo de Filozofia Asocio Tutmonda (FAT). Eldonata de Kultura Fondaĵo Simpozio. Teknika eldonisto: Gersi Alfredo Bays (Chapeco, BR), Florianópolis (SC, BR), marto 1983- nov. 2009? 44 p. 21x15, presita. Almenaŭ 46 n-roj. Ĉefred. d-ro Evaldo Pauli, Albert Goodheir (Coatbridge, GB), Eugène de Zilah (Creue, FR), Geraldo Mattos (Curitiba (PR, BR). IEMW 370.300-B.Esp. [7093]. Fontoj: Katalogo (UEA), 1984/1985, p. 339. kaj 1988/1989, p. 388; Nov-Zelanda Esperantisto, 1983/6, pp. 7-8, Esperanto(UEA), 1990/2, p. 39; Fonto, 1991, n-ro 122, p. IV.
- 12177. Simpozio.** Organo de Skolta Esperanto-Rondo. Szeged (HU), 1946-1947. 4 n-roj. [7094].

- 12178. Simpozio Internacia pri Interlingvistiko kaj Esperantologio, 1-a.** Massa (IT), 2/8 Majo 1983, 6 p. (faldeblaj), 21,5x10,5. Fonto: BAM.
- 12179. Sindikata Esperantisto.** Ie en Ĉeĥoslovakio (CS/CZ?), 1955. Sola n-ro. [7096]. Ĉu ĝi aperis? Fonto: Svitovsky Esperantista, 1955/1.
- 12180. Sincériste, Le.** Ie en Francio (FR), 1924, en lingvoj franca kaj Esperanto. Fontoj: Stojan (3811), p. 347; Takács (1098).
- 12181. Sind & Samfund.** Titolvarianto: Sind a Samfund. Dana presita, ilustrita revuo, enhavas Esperanto-parton sub titolo «La Forta Voko» (ĝis nun memstara Esperanto-gazeto). Köbenhavn (DK). Red. D-ro Paul Neergaard. Fonto: Heroldo de Esperanto, 1928/25, 1928 junio 22, p. 5; Stojan (3338), p. 323; Takács (447).
- 12182. Sinopse estatística do Brasil.** Statistical abstract of Brasil. Statistika resumo pri Brazilo. Eld. Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística (I.B.G.E), Rio de Janeiro (RJ, BR), 1946. 1947. XLVII, p. 267, 27x17, presita, ilustrita. Fonto: Katalogo de la Esperanto-kolektaĵo de Károly Fajsz. Vol. 1. p. 110. (1124).
Sin si dzi. ☞ **La Novaj Tempoj.**
- 12183. Sistema librolisto de la biblioteko de Klubo Esperantista de Malmö.** Eld. Klubo Esperantista de Malmö. Malmö (SE), 1956, 37 folioj, 30x21. Dokumento Esperanta. IEMW 702.395-C.Esp-2. Fonto: Katalogo de la Esperanto-kolektaĵo de Károly Fajsz. Vol. 2. (5224).
- 12184. Situation officielle de l' enseignement de l' Esperanto dans le monde.** Franca eldono de «La oficiala situacio de la Esperanto-instruado en la mondo». Rotterdam (NL), 1982, 24 p. tajpita ofsetita. IEMW 371.950-B.11.Esp.
- 12185. Sixth International Seminar organizes by the German Young Esperantists.** Londono. [London] , 1963. Eld. UEA, Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED), 2 folioj. UEA, CED, I.; III; 10. Dokumento angla. IEMW 701.080-C.Esp-09.3.10.
- 12186. Skandalo, La.** Monata movada folieto. Ie en Kolombio (CO), 1939? 1940? [7097]. Fonto: Esperanto Internacia, 1940/4, p. 76.
- 12187. Skandinava Esperantisto.** Ie en Norvegio (Kristiania?/Oslo?), 1905. [7098], presita en Esperanto kaj sveda lingvoj. Fonto: Germana Esperantisto, 1906/1, p. 10?
- 12188. Skandinava Esperantisto.** Rockford (IL,US), Unua serio: sept. 1916-1917. Dua serio: Eld: Scandinavian Esperanto Institute. majo 1922-dec. 1923, 8 + IV p- 24x16, presita. Red. Karl Hjalmar Fröding-(en ambaŭ serioj). Komplete en GEBA (1500). IEMW 703.680-B.Esp. [7099]. Fontoj: Esperanto Triumfonta, 1992-06- 11, n-ro 88, p. 3; Stojan (3418), p. 328; Takács (1099).
- 12189. Skania Informilo.** Organ för Svenska Esperanto-Förbundets, Skåne district Hälsingborg. Eld. Klubo Esperantista. Hälsingborg (SE), dec. 1936-sept. 1937? Almenaŭ 5 n-roj. Malmö (SE) ?- junio 1940, 4 p. 37x23, tajpita ĉefe svede, hektografita, ilustrita. Red. Jan Strönné, poste Wilhelm Johansson (Malmö) . IEMW 705.044-D.Esp .1. [7100]. Fonto: Svenska Esperanto-Tidningen, Junio 1940, p. 70.
- 12190. Skarabo, La.** Monata organo de Teozofia Esperantistaro. Westfield (GB), Torquay (GB?), 1917? 1918? Sola n- ro? Red. van Mej E. M. Murdock. [7101]. Fonto: La Holanda Pioniro, 1918/2-4, p. 27.
- 12191. Skerco.** Sen eldonloko. 1998/1,2 . Almenaŭ 2 n-roj. [11066]. Fonto: La Ondo de Esperanto. 979
- 12192. Skizeto.** Eld. Esperanto-Asocio de New-Yersey. Komplimenta eldono. Newark (NJ,US), ? -Febr. 1963-marto 1963 -? [7102].

Skizeto. ☞ **La EANJ-Skizeto.**

12193. Skolta Bulteno. Dumonata, poste kvaronjara oficiala organo de Skolta Esperantista Ligo. London (GB), Ipswich (GB) sept. 1931-1940, 16 p (kun kovriloj), 24x16. Almenaŭ 37 n-roj. Fondinto kaj Honora Prezidanto S-ro Alexander William Thomson («Avoto»), red. (en 1938) F. Douglas Murphy. Adm. Robert Augustus Davis (London, GB). Org. F. N. Blythke (Ipswich, GB). IEMW 703.258-B.Esp. GEBAA (487). Aldono al Skolta Bulteno ĉ. 1937: La Skolta movado. Ĝia bezono de Internacia Lingvo. Verkis/red. Sven Alexandersson.* [7104]. Poste: La Skolta Mondo. Fontoj: Jarlibro de la Esperanto-Movado, 1933, pp. 418-419; La Espero, 1935, aŭg. p. 115; Pola Esperantisto* 1937/10, p. 112; The British Esperantist, 1948, March/April, p. 140.

Skolta Esperantista Ligo. ☞ **Oficiala Informilo. (Antwerpen, 1953-1960).**

12194. Skolta Esperantista Ligo (SEL). Bulteno. Huddersfield (GB). Unua serio: Aprilo 1921-1922, 1-4 p. 20,5x13,5, presita. En 1921 aperis 2 n-roj, entute 5 n-roj. Tria bulteno. Adr. Norman Booth (Netherton, Huddersfield, GB). Kvara bulteno: junio 1922.* Dua serio: Antwerpen (BE), ?-1954-1955 ? A5. Red. J. Gulck. IEM 706.004-C.Esp. [7105, 7106]. Fontoj: Esperanto Triumfonta* 23 Julio 1922, p. 3; Stojan (3812), p. 347; Takács (1100); BAM.

12195. Skolta Esperantista Ligo. Bulteno. Kraków (PL), jan.-majo 1935. Almenaŭ 2 n-roj. IEMW 703.587-B.Esp.

12196. Skolta Esperantisto. Cirkulero de la Szegeda Skolta Esperantista Rondo. Szeged (HU), marto 1947, A4, multobligita. Almenaŭ 3 n-roj. Red. Ernő Farkas. IEMW 703.463-C.Esp. [7107].

12197. Skolta Esperanto-Ligo. Bulteno por la Nederlanda Sekcio. Zaandam (NL), 1973-01-02, 1 p. 30x21. Red. Ko Hammer? [7108].





12198. Skolta Esperanto-Ligo. Ie en Japanio (JP). BXL00154@nifty.ne.jp. Fonto: La Revuo Orienta, 2005 aŭg/sept. p. 59.

12199. Skolta Heroldo. Trimonata organo por katolikaj skoltoj. Oficiala organo de la Skolta Esperantista Ligo. Franclingva eldono. Fondis, direktoris kaj redaktis Georges Rambaux. Paris (FR), julio 1926-1933, 8-16 p. 27x19, presita. La unua kajero estis aldono de Espero Katolika. Komence de 1930 aperis sen speciala kovrilo, nun (en 1930) havas koloran eksterajon, sed eliras ĉiuj trimonte en amplekso de 16 paĝoj. La formato, preso, apero estis tiu de «Espero Katolika*». Okaze de la Jamboreo 1933, en Budapest-Gödöllő (HU) ĝi aperis en 2 mil ekzempleroj. IEMW 700.111-C.Esp. GEBAA (489). [7109]. Fontoj: Esperanta Junularo, 1927 aŭg. p. 14; Heroldo de Esperanto, 1927/11, p. 4; Stojan (3274), p. 317; Heroldo de Esperanto,* 1930/43 (591), p. 3; Bulgara Esperantisto 1931/7-8; Takács (1101); Enciklopedio de Esperanto, p. 461.

Skolta Informilo «Estu preta». ☞ **Oficiala informilo «Estu Preta».**

12200. Skolta Mondo, La. Trimonata membrogazeto de la Skolta Esperanto-Ligo. Gazeto por skoltoj. Liverpool (GB), Ipswich (GB), Zaandam (NL), Skien (NO), junio 1948-1997 -? Ekde 2007 kvaronjara reta organo de Skolta Esperanto-Ligo (SEL). Red. Guido Ricci, Kraainem (BE), sel@scoutnet.org. s-ro George Rust (Southampton, GB), poste (en 1949) s-ro J.H. Westcott (antaŭ 1960, abonantoj el 19 landoj), en 1988 Hans Amund Rosbach, en la lastaj jaroj F-ino Anna Margareta Ritamäki (Turku, Abo FI). A.Ritamaki@sheffield.ac.uk. ISSN 0037-6588. IEMW 703.258-B.Esp. Preskaŭ komplete en GEBAA (490). [7110]. Antaŭe: Skolta Bulteno. Poste: Fontoj: Esperantista 1948/6, junio, p. 68; La Praktiko, 1954 Febr. p. 19; Katalogo (UEA), 1980/1982, p. 289; Esperantolehti, 1993/4, p. 13; Esperanto sub la Suda Kruco, jan-febr. 1994; Internacia Pedagogia Revuo, 1994/3, p. 22; Jarlibro de UEA, 2008, p. 75.

- 12201. Skolta Revuo.** Ie en Usono (??,US), junio 1961. [7111]. Fonto: The British E-ist, 1961 nov. p. 159. Skota Esperantista Federacio. Bulletin. ☞ — **Bulletin. Skota Esperantista Federacio.**
- 12202. Skota Esperanto-Federacio.** La kvina ĉiujara Skota kongreso. Programo kaj tagordo, kun diversaj kantoj. En la kristana instituto. Glasgow (GB), 1911? Red. E-M. Mabon. Fonto: Oficiala Gazeto Esperantista, 1910 Nov. p. 193. 73-a ĉiujara kongreso. Programo, aliĝilo. Alloa (GB), 1978-05-26/28, 4 p. A6, presita sur kolora papero. Aldono al «Esperanto en Skotlando», n-ro 107 (1977). [9657, 9728]. Fonto: Esperanto en Skotlando, n-ro 110.
- 12203. Skota Federacio Esperantista.** Bulteno. Kilbirnie (GB), Unua serio: 1930 -? Dua serio: 1942-1944. IEMW 703.568-B.Esp-1. N-ro 18 en Oregon Library. [7112].
- 12204. Skota Federacio Esperantista.** Septembra Semajnfino. Alloa (GB), 1977-09-30/10-02; 1978-09-29/10-01, 4p. 15x11. Aldono al «Esperanto en Skotlando», n-ro 106. [9658, 9729]. Fonto: BAM.
- 12205. Skota Standardo, La.** Perth (GB), marto 1909. 22x14, ciklostilita. Sola n-ro. Red. G.A. Brown. [7113]. Fontoj: Katalogo de Georg K. Davidov; Stojan: (3813), p. 347; Takács (1102).
- 12206. Skotlando Vokanta.** Titolvarianto: Skotlando Vokas. Scotlands own independent Esperanto Monthly. Glasgow (GB), 1945-1947, 8 p. A5?, presita, ilustrita. Almenaŭ 12 n-roj. Red. A. Gordon (Kilmarnock), J.D. Braney. IEMW 703.403-B.Esp. N-ro 8 mankas la Biblioteko de B.E.A. [7114]. Antaŭe: Fajra Kruco. Fontoj : The British Esperantist, 1946/Nov.-Dec. p. 189; Kaj 1947 March/April, p. 34.
Skotlando Vokas. ☞ **Skotlando Vokanta.**
- 12207. Skribas laboristoj el Leningrad.** Leningrad/St. Peterburg (SU/RU), 1935-1936, 12 p. 25x18. Almenaŭ 2 n-roj. [7116].
- 12208. Skribo -Welken.** Eldonloko nekonata. 1992. GEBA (1620).
- 12209. Slava Esperantisto.** «Proponis s-ro dr. Skalkowski, ke estu fondita slava gazeto, kies unuaj numeroj povus limiĝi je modesta bulteno kvarpaĝa, eldonata en Praha kaj almetata al Ĉasopis Ĉeskych Esperantistu, Pola Esperantisto, Espero, Lumo, Bulgara Esperantisto kaj Voĉo al Kuracistoj». Varme rekomandis la proponon s-ro Anton Grabowski kaj s-ro Charalambev/Ĥaralambev, redaktoro de «Lumo». Fonto: Pola Esperantisto, 1908/11, p. 174. La plano ne realiĝis.
- 12210. Slava Revuo.** Literatura Revuo. «De la 1-a januaro [1908] eliros en la sama lando [AT/CZ] monata gazeto »Slava Revuo«. Ĝi estos ekskluzive literatura gazeto, kiu alportadas en simpatia aranĝo tradukaĵojn plej multe el slava literaturo. [Organizos] s-ro F. Vejmelka (Benešov apud Praha).*» Prag/Praha (AT/CZ), jan. 1908. Sola n-ro. [7117]. Fontoj: Lingvo Internacia,* 1907/11, p. 517; Germana Esperantisto, 1907/12, p. 130-131; Stojan p. 353; Takács (1103).
SLEA. ☞ **Nia Okcidenta Informilo. (Hisingkärra)**
- 12211. S.L.E.A. Eld. S.L.E.A.** [Sveda Laborista Esperanto-Asocio]. Mölndal (SE), 1938. Aperas monate. IEMW 706.632-C.Esp-1.
- 12212. SLEA-Aktivisto.** Aktivisto de S.L.E.A. Organo de Unuiga Komitato en Svedio kaj Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE). Eld. Sveda Laborista Esperanto-Asocio. Malmö (SE), ?-1933 -junio 1936 -? Almenaŭ 12 n-roj en la sveda kaj Esperanto. IEMW 706.759-D.Esp. [6949, 7118]. Fonto: Ricevis «Britia Bulteno. PEK», okt. 1936.

- 12213. SLEA-Infornilo.** Devizo «Per Esperanto por la internacia laborista movado». Dumonata organo de Sveda Laborista Esperanto-Asocio, Svenska Arbetar-Esperantoförbundet. Stoc-kholm (SE), Farsta (SE), Malmö (SE). Unua serio: jan. 1964-febr. 1970. Dua serio: 1995-2004/5 -? 4-24 + IV p. 21x15, tajpita, ofsetita, kun presitaj koloraj kovrilpaĝoj. Aperas 5-foje jare. Red. Egon Göransson, Signe Larsson, Corrie Lindquist (1970), P. Persson (Farsta,SE). IEMW 708.196-B-D.Esp. GEBA (414). [7119]. Fontoj: SAT-Amikaro, okt. 1970, kaj 1980/nov.-dec. p. 69; Katalogo (UEA), 1980/1982, p. 289; The Worker Esperantist, n-ro 321, Febr./March 1982, p. 10; Migranto, 1991 dec. p. 13.
- 12214. Slipo.** Tagĵurnalo laborbrigada. Eld. IV-a Esperantista junulara laborbrigado. Tjentiŝte (YU/BA), sept. 1962, multobligita. Sola n-ro. Ĉiutage alia titolo el 25 n-roj 16 en Esperanto. 7-kapa redakta komitato (Listo ĉe «Debuto»). La sinsekvaj Esperanto-titoloj: Debuto, Kanjono, Tribo, Ondo, Roko, Rado, Festo, Ombro, Tiel, Spegulo, Kanto, Medalo, Mardo, Sapo, Slipo, Oriono. [10365]. Fonto: Jugoslavia Fervojisto, 1962, p. 267.
- 12215. Slovakaj Novaĵoj en Esperanto.** Ie en Slovakio (CS/SK), Julio 1970. Fonto: Bulgara Espe-rantisto, 1970/11, p. 16.
- Slovakia Esperanta Junularo. -- vd. groups.yahoo.com/group/skej. **Slovakiaj Novaĵoj.**  **Slowak News. Slovakiaj novaĵoj en Esperanto.**  **Slowak News. Slovenské Esperantské Sdruenie.** -- vd. **Informácie. SES-infomoj.**
- 12216. Slovena Esperantisto.** Eld. Ĵeljko Deziderij Mizerit. Ie en Jugoslavio/Slovenio (YU/SI), 1938-1939. Red. (certatempe) Joĵe Kramar. [7121]. Fontoj: Leksikono de Jugoslaviaj espe-rantistoj, p. 115; Kajeroj, n-ro 11, p. 31; Kaj n-ro 12, p. 29.
- 12217. Slovenia Esperanto-Ligo.** Informa bulteno. Ljubljana (YU/SI), 1953. Sola n-ro? [7122]. Ka-talogo de Oregon Library.
- Slovensky Esperantista.  **Esperantisto Slovaka.**
- 12218. Slowak News.** Slovakaj novaĵoj en Esperanto. Regule aperas en lingvoj angla, rusa, franca kaj germana. Specialaj numeroj. (Eksterordinaraj n-roj en Esperanto). Eld. Nacia Fronto de SSR [Slovaka Socialisma Respubliko]. Monata bulteno eldonata de «Obzor», gazetagentejo «Tatrapres». Bratislava (CS/SK), julio 1969- julio 1970, 28-32 p. 28x22, 29x21. Almenaŭ 2 n-roj. IEMW 709.981-C.Esp. GEBA (1305). [7120]. Fontoj: Esperanto (UEA), 1969/6, p. 99; Bulgara Esperantisto, 1969/9, p. 11; Hungara Esperantisto, 1969/nov. p. 22; The Briti-sh Esperantist, 1970/jan. p. 255; Heroldo de Esperanto, 1970/10, Julio 4, p. 4.
- 12219. S.L.P.- Folio, La.** Organ of Socialist Labor Party. Deleonista organo de Socialista Laborista Partio (S.L.P.), Social-Partio de Usono. Organo por diskonatigi la fundamentan idearon de la Socialista Laborista Partio Usona. Deleonismo kompletigas, ne revizias la Marksismon [Pri-laboris Daniel De Leon]. Devizo: «Laboristoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!» New York (NY, US), 1947?- sept. 1953, 3-12 p. 22x18, stencilita. Almenaŭ 40 n-roj. La 8-a numero estas presita en St. Louis (US). Red. Th. Weder (New York). IEMW 703.404-C.Esp. GEBA (418). [7123]. Aldono: Respondilo Deleonista. Fontoj: Heroldo de Esperanto, 16 Febr. 1948, (1082), 1948/4, p. 4; La Klasbatalo, 1948 aŭg. p. 16.
- Sme.  **Semo. (Gabrovo, Veliko Tirnavo).**
- 12220. Smeralda Lando.** Dulingva organo. St.-Malo-St.-Servan (FR), jan. 1906. [7124]. Fonto: Lingvo Internacia, 1906/9, p. 268.
- 12221. Smeraldo.** Aperis en Anhuj provinco (CN). Fonto: Retletero de s-ro Lin Baoguo, 2008-01-28. Ĝi estas 15-a en la listo de ĉiniaj Esperanto-periodaĵoj.
- 12222. Smoko informas.** Ĉiutaga bulteno de la 43-a IJK. Kraków (PL), 1987-07-18/07-23, 4 p. 25x17, ofsetita. 5 n-roj. [7125].

- 12223. SM'76.** Abonilo por la Somera Migrado. Eldonloko nekonata. 1976-1977, 2 p. A5, ofsetita, en Esperanto. Mil ekzempleroj. Aŭtoro/red. D. Mühlemann. [7126].
- 12224. SNEES.** Southern New England Esperanto Society. Neoficiala bulteno-aperas tute hazarde. West Hartford, (CT, US), nov. 1991-1994, 4-6 p. 28x22, ofsetita. [7127]. Poste: SNEES-Bulteno.
- 12225. SNEES Bulteno.** Kvaronjara gazeto de la Sudnovanglia Esperanto Societo. Waterbury (CT, US), West Hartford (CT, US), 1992-1995. Jarkolekto 4 n-ro 1 aperis en 1995, 8 p. A4. Oni voĉdonas pri alia titolo. [9659, 10591]. Antaŭe: SNEES.
- 12226. Sociaj aspektoj de la Esperanto-Movado.** Scienca kunveno okaze de la centjara jubileo de Esperanto kaj la 22-a de Jugoslavio Esperanto-Ligo. Temaro, programo, aliĝilo. Organizas Jugoslavio Esperanto-Ligo, Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino. Banja Luka (YU/BA), 20-21 junio 1987, 4 p. A5, presita, ilustrita. [7128]. Fonto: BAM.
- 12227. Socia Kajero.** Tokyo (JP), 1951. Almenaŭ 3 n-roj. [8683]. Fonto: Mankolisto de IEMW, p. 63.
- 12228. Social-humanista Gazeto.** Titolvarianto: Social-Humanista. Dulingva organo de la Unua Social-Humanista Amikrondo. Tutmonda Humanigista Int.? Plurlingva gazeto (precipe en Esperanto kaj lingvo kataluna, krome en la lingvoj hispana, portugala, franca, germana). Aperadas monate en formo de cirkulero. Revuo de la organizo aperas semestre (duonjare), samtempe aperadas Jarlibro. Terrassa (CAT, ES), jan. 1981-1983. Ĉefred. Giordano Moya. Almenaŭ 20 n-roj. GEBAA (79). [7129, 7130]. Poste: Humanista Internacio (de jan 1984), pli poste (de okt. 1984) Tutmonde. Fontoj: La Brita Esperantisto, Majo-Junio, 1982, p. 137; Esperanto Informa, 1982/5, p. 6; L' Esperanto, apr. 1982, p. 9; Esperanto en Skotlando, 1981 N-ro 122-123; Reta informo de Ana Maria Molera.
- 12229. Socialismo Esperantista.** Dulingva (Esperanta kaj hispana) organo de la socialistaj esperantistoj de la hispana ĉefurbo, eldonita de la Popoldomo de Madrido, Casa del Pueblo. Madrid (ES), aŭg. 1914 -? 4 p. 34x24. Sola n-ro. [7131]. Fontoj: Stojan (3814), p. 347; Takács (1105); Antonio Marco Botella: Analoj de la esperanta movado en Hispanujo. p. 99.
- 12230. Socialista Esperantisto, La.** Eld. Sekcio ĉe la Socialista junular-organizo «Estonto». Lodz (PL), 1933? Hektografita bulteneto. Fonto: Sennaciulo, 1933 junio 25, p. 102.
- 12231. Socialista Esperanto-Servo.** Laborista organo. Ie en Aŭstrio (AT). Post 1931? [7132]. Fonto: Mencias Enciklopedio de Esperanto, p. 174.
Socialista Laborista Partio. ☞ **Respondilo Delonista. (New York)**
- 12232. Socialist Espérantiste, Le.** Organe bimestriel d' E.S.F.I.O. Filatela dumonata revuo en franca lingvo kaj Esperanto. Aperadis neregule. Paris (FR), Valenciennes (FR), 1933 -1938, 4 p. 44x32, presita en la franca lingvo. En 1938 aperis la 117-a numero.. IEMW 706.758-D.Esp. [7134]. Fonto: Franca Esperantisto, jan. 1934, p. 24.
- 12233. Socialisto.** Laborista, klasbatala organo. Lisboa (PT), aŭg. 1919-apr. 1920, 4 p. 38x26, presita en du lingvoj (portugala kaj Esperanto). Red. J. Pires Barreira. Esperanto-fako de la portugallingva gazeto «O Socialista». [7133]. Fonto: La Esperantisto, nov. 1919. p. 4.
- 12234. Socialisto, La.** [Oficiala organo de] Socialista Esperanto-Asocio por la germanlingvaj regionoj. Frankfurt am Main (DE), 1932? 1933? Fonto: Jarlibro de la Esperanto-Movado, 1933, pp. 428-429.

- 12235. Socialisto, La.** Ĉiudumonata organo de Internacio de Socialistaj Esperantistoj (ISE). Rotterdam (NL), 1934-1938, A3, 2 n-roj. Eldonnumero 4 mil. Red. Chammare. IEMW 703.489-D.Esp-1. «Ekzistas jam 4 »Internacioj« de laboristaj Esperantistoj: SAT (supertendenca), IPE (komunista), ISE (Socialista) kaj TLES (anarkiista)».* IEMW 703.489-D.Esp. [7135]. Fonto: Flandra Esperantisto,* 1933 nov. p. 43.
- 12236. Socialisto, La.** Dulingva kvaronjara organo de Aŭstria Laborista Ligo Esperantista (ALLE). De 1930 oficiala organo de Socialista Esperanto-Asocio en Germanujo. Lokaj ligaj informoj. Eld. Otto Simon. Unua serio: Wien (AT), jan. 1926- febr. 1934, 8 p. 24x16; de 1931 32x24. Red. Ferdinand Seidl, Martin Klein, Adalbert Klatil kaj Hans Weinhengst. Sekr. Franz Jonas. 159 n-roj. Speciala n-ro por la junularo (julio 1929). En 1934 jam havas eldonnumbron de 4 mil. Laŭ Enciklopedio de Esperanto, p. 328. Ĝi reviviĝis en Francio. Dua serio: Kvaronjara organo de Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE), 1962-apr./junio 2000. Red. (en 1962) Friedrik Mosek, (en 1964) d-ro Franz Scheibenreiter. Resp. red. (en 1981- 1982) Max Finkenzeller kaj Walter Habert. De 1993/1 red. s-ino Helga Farukuoye. De 1999 4-paĝa, tajpita multobligita gazeto. Ekde 2001? paĝoj de «La Socialisto» poste aperas en LEA/G Magazino (ekde n-ro 29). IEMW 700.053-B.Esp. kaj 949.465-B.Esp-1. GEBAA (332). [7137, 7138]. Fontoj: Esperanto(UEA), 1926/4, p. 87 (19); Esperanta Junularo, 1929 n-ro 7/8, p. 71; Stojan (3318a), p. 321; Aŭstria Esperantisto, 1932/1 p. 8; Jarlibro de la Esperanto-Movado, 1933, pp. 428-429; Ta- kács (1107); Hungara Heroldo 1835/1 (Febr.) p. 24; The Worker Esperantist, 1964/6, n-ro 162, p. 451; Heroldo de Esperanto, (1374), 1964/5, p. 2; Bulteno (AFEF), 2001/2, p. 2.
- 12237. [Socia Movado].** «En ĉ. 1922-1923 la anarkista movado eksterordinare kreskis en Ĉinio. En Pekin [Beijing] (CN) funkciis »Socia Movado« kun presorgano». Ĉu la presorgano nomiĝis «Socia Movado»? Fonto: Sennacieca Revuo, okt. 1923, n-ro 43, p. 14.
- 12238. Socia Revuo.** Komunista organo.* Genève (CH), Okt.-nov.1907 okt. 1908 . [7139]. Fontoj: Lingvo Internacia, 1907/12, p. 566; kaj 1908 /10, p. 380; Stojan* p. 353; Takács (1104)* sen aperdatoj.
- 12239. Sociedad Cubana para la Propagacion del Esperanto.** Eld. Sociedad Cubana para la Propagacion del Esperanto. [La] Habana (CU), Unua serio: 1911-? 22 p. IEMW 702.583-A.Esp-1. Dua serio: 1925 -? [8] p. IEMW 701.429-C.Esp-1.
Sociedad Española para la propaganda de Esperanto. Circular. ☞ **Circular Sociedad Española para la propaganda de Esperanto.**
- 12240. Sociedad Uruguaya de Esperanto (UES).** Montevideo (UY), 1951 -1957. Almenaŭ 20 n-roj. IEMW 706.030- B.Esp. [7141]. Poste: Boletín de la Sociedad Uruguayo de Esperanto. Fonto: BAM.
- 12241. Sociedad Uruguaya de Esperanto del Boletín.** Suplemento del Boletín (en Esperanto). Montevideo (UY), 1955 (n-ro 14); 1956-05-15; (n-ro 18); 1956-09-15 (n-ro 19), 2-4 p. 23x16. [7142].
- 12242. Societa Vespero okaze de l' 50a naskiĝtago de D-ro L.L. Zamenhof.** [Invitilo]. 18an Decembro 1909, kun tri kantoj. 2 paĝoj. Eldonas, organizas Esperanto-Grupoj de Hamburgo-Altona. Hamburg (DE). Fonto: Georg K. Davidov: Bibliografio, p. 116.
- 12243. Société Espérantiste de Lyon.** Monata movada organo. Lyon (FR), 1961-1965, 2 p. 28x22, hektografita. 25 n-roj. [7143].
Société Française pour la propagation de l' Esperanto. ☞ **Annuaire de la Société Française pour la propagation de l' Esperanto. (Reims, Paris) .**
- 12244. Societo de Amikoj, La.** Eldonloko nekonata. Ĉu ĝi estas revuo? Fonto: Ricevis Libero, n-ro38, okt. 1933, p. 25.

- 12245. Societo de Aŭstria Esperanto-Instruistoj.** Provizora informilo. Eldonas Societo de Aŭstria Esperanto- Instruistoj. Graz (AT). Unua eldonjaro: 1963. Red. Josef Wesian. Dua serio (Wien (AT): 1974-1985. Cirkulero n-ro 5 aperis en jan. 1985. IEMW 371.240-C.Esp. [7145]. Antaŭe : Cirkulero. Societo de Aŭstria Esperanto Instruistoj. Österreichische Esperanto-Lehrer-Vereinigung. Fonto: Aŭstria Esperanto-Revuo, 1985/1, p. 6
- 12246. Societo de Esperantistoj-Studentoj en Utrecht.** Utrecht (NL), Dokumento Esperanta, nederlanda. Sen eldonjaro. IEMW 707.384-C.Esp..
- 12247. Societo de Internaciaj Korespondamikoj (SIKA).** Subtitolo: Nomaro. Ampleksa listo , kun fotoj de japanaj korespondemuloj sub la devizo «Por paco per Esperanto» « Unu mond' unu familio». Aiĉiken (JP), 1959-1960. Red. Mori jamaŝi. Fontoj: S.A.T.-Amikaro, okt. 1969, p. 56; Kaj 1960 okt. p. 86.
- 12248. Societo por Internaciaj Rilatoj.** Paris (FR), 1905. [9660]. Fonto: La Holanda Pioniro, 1905, p. 62.
- 12249. Societo por Internacia Kontakto.** (Esperanto-Amikoj). Wien (AT), 1960, 2 p. 30x21, multobligita. 5 n-roj. Beilage zur «Aŭstria Esperanto-Revuo». Aldono al «Aŭstria Esperanto-Revuo» sept.- okt. 1960. [7146].
- 12250. Societo por Internacia Lingvo.** Cirkulero. Flensburg-Mürwik (FRG/DE), 1952- marto-apr. 1956 -? Almenaŭ 47 n-roj. Red. dr. A. Bormann. IEMW 701.536-C.Esp. [7147]. Fontoj: Medicina Revuo, 1955 aprilo, p. 13; Heroldo de Esperanto, 1956/16, p. 4; La Suda Stelo, 1956 dec. p. 109.
- 12251. Societo Zamenhof.** Cirkulero. Eld. UEA. [Universala Esperanto-Asocio]. Rotterdam (NL), 1975-1982. [7148].
- 12252. Society of British Esperanto Teachers.** Kvaronjara, parte nacilingva organo. London? (GB), 1939-1962, 12 p. 33x20, multobligita. [7149]. Poste: The Esperantist Teacher.
- 12253. Socikultura kaj movada retgazeto «Teflono».** (Kulturo 123456789). Eldonloko nekonata.
- 12254. Socilingvistikaj aspektoj de la internacia lingvo.** Dulingva konferenco-dokumentaro. Tokyo (JP), (1986) 1987, 205 p. 26x18. La konferenco okazis en 1986. [7150].
- 12255. Socivojaĝa Servo de S.A.T.** [Sennacieca Asocio Tutmonda]. Amboise (FR), 1990-1995? 110-112 p. A5, kun maparo. Ilustrita. [10592]. 268 membroj en 33 landoj. Fonto: Katalogo de la Esperanto-kolektaĵo de Károly Fajsz. Vol. 2. (5378).
- 12256. Södertälje Tidning.** Ĉiusemajna organo/rubriko por la Societo Esperantista? «Unulingveco» en la svedlingva revuo Södertälge Tidning. Ĝi funkciis kiel tutlanda Esperanto-organo. Södertälje (SE), 1901-1903. Fondinto/gvidanto/red. John Joseph Süssmuth. Pro la rubriko ni devus listigi ĝin en la duan volumon, sed pro la ago de Takács kaj pro ĝia graveco (landa karaktero de la organo) ni nepre devas aperigi tie ĉi. Soedertelge Tidning (Ĉe Takács tiel!) — ... Södertälje Tidning.
- 12257. Soelo.** Organo «Verda Stelo». Fonto: La Ponto, 1953/2, p. 16.
- 12258. Sofia Informbulteno.** Sofia (BG), 1982, 32 p. 21x15. Almenaŭ 3 n-roj. [7151]. La unuaj tri n-roj konsulteblas en la Kolektaĵo de Károly Fajsz en Budapeŝt (HU).

- 12259. Sokola Kongreso.** X-a kongreso. La ĉefa kultura okazaĵo de Eŭropo, 1938. Programo de la kongreso, historio de la Sokola Movado.. Eld. Ĉeĥoslovaka Ministerio de Komerco. Praha (CS/CZ), junio-julio 1938, 12 p. 21x19, presita, ilustrita. Dokumento Esperanta. IEMW 705.968-B.Esp.-019.1. [7152]. Antaŭe: Sokola Kongreso, 1912 vd. *Bohema «Sokol» kaj la VI Gimnastika Kongreso en Praha, La, 1912. Poste: Sokol-festaro. Fontoj: Ligilo, 1938/6, p. 55; Franca Esperantisto, 1938 Majo, p. 77; La Praktiko, 1938 Majo, p. 4; Esperanto Internacia, 1938 Majo, p. 72; Argentina E-isto, majo-junio, p. 11.*
- 12260. Sokol-festaro, La XI.** Eld. Komitato de la Sokola Kongreso, Praha (CS/CZ), 1948 [1] p. IEMW 704.155- C.Esp-114.
- 12261. Sokol-Olimpiado.** La X-a Olimpiado. Eld. Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo. Praha (CS/CZ), 1938, 8 p. 15x10, presita. Ilustrita faldprospekto pri la festoj de la Ĉeĥoslovaka Gimnasta Asocio «Sokol», okazontaj en julio 1938. [7153, 8953]. Fontoj: Esperanto Internacia, marto 1938, p. 44; Heroldo de Esperanto, 1947/47, p. 4; BAM.
- 12262. Sol, El.** Porlamar (Isla de Margarita, VE), 1911-1912- 1914? ? Organo de la Tipografia de «El Sol». En n-ro 285 aperis varma noto pri «Kuracisto» kaj la T.E.K.A. Red. Eleuterio Rosario Campo. Aperadas sporade. N-ro 365 aperis en 1912 IEMW 703.749-C.Esp. Fontoj: La Ondo de Esperanto, 1912/3, p. 52; Dankis la red. de „La Kuracisto, 1914 junio, p. 89. Ĉu ni aperigu ĝin en la 2-a volumo?
- 12263. Soldaten-courant.** Eldonloko nekonata. 1915 jan.-? Esperanto-kurso de s-ro H. Blok Heinman . Fonto: La Holanda Pioniro, 1945, febr. p. 21.
- 12264. Solena numero.** Okaza memorkajero de Ekskursantoj al Jiĉin. Jiĉin (AT/CZ), 1910-06-27). Enhavo de la 16- paĝa kajero: Bohema [ĉeĥa] traduko de himno «La Espero» kaj poemo «Al la fratoj», esperantlingvan artikolon pri la rokaro de Írančov kaj bohemingvaj artikoloj inter aliaj pri Zamenhof, esperanto-kongresoj, UEA. Eld. s- ro J.V. Hamáček (Jiĉin). Fonto: Časopis Českých Esperantistu., 1910, p. 94.
- 12265. Solidareco.** Propaganda bulteno de Internacia Asocio Bellamy. Driehus (NL), 1938, ciklostilita organo. [7154]. Fonto: Flandra Esperantisto, 1938 julio, p. 11.
- 12266. Solidarność.** (Solidareco). Informilo de Soci-esplora Centro por la regiono de Meza Odro de Sendependa Aŭtonoma Sindikato «Solidarność». Zielona Góra (PL), 1981, 6 p. 30x21, ofsetita. Sola n-ro. Red. Jan Nowik. [7155].
- 12267. Solidarulo.** Monata resumaro el la Belia Laborpartio PUDA-PTB. (Komunista Esperantista Kolektivo por Belgio). Resumaro el laborpartia organo. Bruxelles (BE), jan. 1994-1995/1, 12 p. A4. Red. R. Bastin, Kris Merckx. [7156]. Fonto: Ricevis Ruslanda Esperantisto, 1995/4, p. 7.
- 12268. Sol og Sundhed.** Suno kaj Sano. Randers (DK), Jan. 1946 -? La gazeto estas dediĉita al nudismo, sunbanado kaj natura sanigo. Artikoloj en lingvoj Dana, Angla kaj Esperanto. Ĝi rekomencas sian vivon. Fonto: recenzita en The British Esperantist, March/April 1946, p. 131.
- 12269. Solparolo.** Eldonita en Asahikawa (JP). Red.? Amagata yoshihiko. Aŭg. 1997. GEBAA (1761).
- 12270. Somera Esperanta Hejmo.** [Esperanto-kurso]. Japana organo kun Esperanta subtitolo. Eld. Hokkai Centro de Esperanto-Propaganda Asocio. Jamabe (JP), 1933, 7-8 p. 22x15, presita en la japana. IEMW 703.815-B.Esp. [7157].
- 12271. Somera Esperantista Familia Tendaro.** SEFT-82. Eld./aranĝas Kulturbund der DDR. [Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko, Laborgrupo Esperanto]. Programo, aliĝilo. Neubrandenburg (DDR/DE), 1982, 3 p. tajpita, multobligita. Red. Werner Pfennig. [10594].

- 12272. Somera Esperantista Familia Tendaro.** SEFT-82. Per propra tendo kaj memprizorgo en pitoreska regiono. [Poŝkalendaro]. Neubrandenburg (DDR/DE), 1982-08-21/28, 2 p. A7.
- 12273. Somera Esperanto-Lernejo.** Letná Škola Esperanto. Dudince (CS/SK), 6.-21. Júla 1975, 4 p. 21x15, tajpita. Stencilita (verda literaro). Dulingva (slovaka kaj Esperanto). [Invitilo]. Okazis la lernejoj ankaŭ en 1974, kaj 1976, 1977 kaj 1978. Fonto: BAM.
- 12274. Somera Esperanto-Lernejo.** Invitilo. Košice (CS/SK), 1974-1978-07-09/22. [7158]. Fonto: Informilo de IEMW, 1978 nov. p. 5; Invitilo. SELKO-82. Somera Esperanto-Lernejo en Košice (CS/SK). 11.-24.07.1982. Jasov (distrikto Košice (CS/SK)). Kune kun invitilo al TUSE-82, semajno por SELKO-82, en Spišská Nová Ves, kampadejo Tatan. 5 p. A5, tajpita, stencilita. Adm. Pavel Pavuk. Fonto: BAM.
- 12275. Somera Esperanto-Lernejo en Eger.** SELE-80, de la 09 ĝis 23 de aŭgusto 1980. Programo kaj aliĝilo. Eger (HU), 1980-08-09/23, 1 p. A4, tajpita ofsetita. [10596].
- 12276. Somera Esperanto-Lernejo en Poprad sub Altaj Tatroj.** 15 jaroj de «SELKO». Invitilo ak SELKO '86 (1986). 6.-19-07-1986; 20.-07.-2.08.1986. 3-4 p. presita, ilustrita.
- 12277. Somera Esperanto-Universitato (SEU).** Provizora programaro. Eld. Estraro de l' Somera Esperanto-Universitato. Gyula (HU), 1963-1990, dulingve presita, ilustrita. SEU-5 (1967), 6 p.; SEU-6 (1968),* ilustrita programo. SEU-7 (1969), 14 p.; SEU-8 (1970), 14 p.; SEU-11 (1973), SEU-12 (1974), 21 p. dulingva. presita, ilustrita, SEU-13 (1975), SEU-14, programaro, servoj, invitilo, 8 folioj, 1976; SEU-15 (1977), 16 +IV p.; SEU-17, julio 1979. SEU-19, (1981). SEU-22 (1986), alvoko, partoprenkotizoj; SEU-26 (1990), 8 + XIV p. Fonto: Informilo IEMW, n-ro 90, Majo 1973, p. 13. Dum la unuaj 15 jaroj okazis 15 prelegserioj, entute 130 prelegoj, por entute 3222 esperantistoj el 20 landoj. Fontoj: La Pacaktivulo, n-ro 75,* p. 31. Informilo IEMW, n-ro 102, Majo 1976, p. III; Kaj Junio, 1979, p. 3; Heroldo de Esperanto, 1977 junio 16, 1977/10, p.2? Recenzis la XXI-an Sesion (1983) Kjell Peder Hoff en Norvega Esperantisto, 1985/2, p. 2; BAM.
- 12278. Somera Esperanto-Universitato, 23-a (SEU).** Medicina Tago. Invitilo. Meghívó. Gyula (HU), 1986-06-30, 8 p. A5, tajpita, ofsetita en 500 ekzempleroj. Kiadja/Eldonisto: Rektoro de SZOTE, Medicina Universitato de Szeged (HU). Resp. Eld. F-ino Katalin Faragó. [7159, 10597]. Fonto: BAM.
- 12279. Somera Esperanto-Universitato, 25-a.** 27-a Jarkunveno de UMEA. [Universala Medicina Esperanto-Asocio]. Invitilo. Szeged (HU), 1988, 8 + IV p. A5, presita. Kiadja /Eldonisto a SZOTE Rektora, dr. Alpány Lajos. Eld. la rektoro de Medicina Universitato de Szeged (HU), en 500 ekzempleroj. [7160].
- 12280. Someraj Esperanto-Kursoj en Lingvolaboratorio.** Eld. Komitato de HEA (Hungara Esperanto-Asocio) en departemento Vaš. Programo, aliĝilo. Szombathely (HU), 1984-08-06-16, 2 p. A5 tajpita, ilustrita; 04-14. de aŭgusto 1985, 2 p. A5, tajpita, ofsetita, ilustrita. Fonto: BAM.
- 12281. Someraj Kursoj.** Groznjan-Grisignana. (Istra-Croatia) (HR), 1994-08-14/21. 4 p. A5. [11067]. Fonto: BAM.
- 12282. Someraj Lernejoj de G.E.E.** Esperantistaj renkontoj de „Grupo de Esperantistaj Edukistoj. 1. La Tranche-sur-Mer (FR), 4-25 de aŭg. 1958. Kursoj por komencantoj/progresantoj. 2. Besancon (Doubs) (FR), Internacia Kultura Ferio. 10-31 aŭg. 1958. Fonto: La Praktiko, junio 1958, p. 94.
- 12283. Someraj Universitataj Kursoj.** Liège (BE), 24 + IV p. presita, ilustrita. Kampuso de la Universitato en Sant Tilman. 30.07-27.08.1972, 20 + IV p. 21x15. Respondeca aŭtoro/redaktoro W.M.A. de Smet (Kalmthout, BE) [4819, 7161].

- 12284. Someraj Universitataj Kursoj.** Summer University Courses Date: 30.07-27.08. 1972. London (GB), Eld. Centro de Esploro kaj Dokumentado: I; III; 12. IEMW 701.080-C. Esp-09.3.12.
- 12285. Someraj Universitataj Kursoj.** Preskomuniko. Liège (BE), 1973-1974, 2 p. 30x21, multobligita. N-ro 4 aperis en 1974. [7162, 10595].
- 12286. Someraj Universitataj Kursoj.** Raporto pri la 3-a sesio. Liège (BE), 1976. La 4-a sesio okazis en 1978-08-06/27, 22 p. (Kursoj pri astronomio, psikologio, internacia literaturo). [7163]. Fonto: Informilo de IEMW, jan. 1977, p. 3.
- 12287. Somera Pedagogia Semajno.** Krasnaja Gora (YU/HR), 1957. [Temo:] Esperanto kaj ĝia instruado en lernejoj. [Laŭ materialo de Somera Pedagogia Semajno en Krasnaja Gora, de 26a julio ĝis 1a de aŭgusto 1957]. Redaktita de Peter Zlatnar]. Ljubljana (YU/SI), Eld. Jugoslavia Esperanto-Federacio, 1959, 200 p. 2 tabuloj, 20x15, ilustrita. Fonto: Katalogo de la Esperanto-kolektaĵo de Károly Fajsz. Vol. 1. p. 187, (1969).
- 12288. Somera Studenta Esperanto-Lernejo.** Torun (PL), 1984.-08-24/31, 12 p. 20x15, tajpita, stencilita, ilustrita. Aperis en 400 ekzempleroj. [7164, 8608]. Fonto: BAM.
- 12289. Somera Studenta Esperanto-Renkonto, 11a.** TEJO/PSEK. Seminario por Esperanto-Aktivuloj, 7a. Eld. Pola Studenta Esperanto Komitato. (PSEK), 2 p. A5, tajpita, ofsetita. Fonto: BAM.
- Somera Universitato. ☞ **Internacia Somera Universitato.**
- 12290. Somera Universitato Malmö.** Programo, prelegaro. Malmö (SE), 1949, 108 p. Eld. por Universala Esperanto-Asocio de The Esperanto Publ. Co. Rickmansworth (GB), The Esperanto Publ. Co. IEMW 371.364-B.Esp. Fontoj: Recenzis K.R.C. Stummy en Esperanto (UEA), 1949/okt. p. 121; Recenzita en The British Esperantist, 1949 sept. okt. p. 77; Heroldo de Esperanto, (1113), 1949/16, p. 4.
- 12291. Somera Universitato, XII-a.** Konferenco de Instruistoj. Konferenco de Virinoj. Wien (AT), aŭg. 1936, 64 p. 24x16. (aperis en 1937). Eldonis Internacia Esperanto-Muzeo, Wien (AT). Kompilis Hugo Steiner. Dum la 28-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Wien, la XII-a. [7165]. Fontoj: Recenzis Na Poleono en Pola Esperantisto, 1937 Aprilo, p. 62; Esperanto Internacia, 1937 Majo, p. 75.
- 12292. Somero.** Nacilingva informa gazeto pri Esperanto. Somero (FI), 1989, ĉiusemajne. Kontribuis per artikoloj Veera Tietti. Fonto: Esperantolehti, 1990/6, p. 7.
- 12293. Sommar.** Eld. Sveda Esperantista Laborista Federacio. Ĉiusomera speciala varbnumero por propagando en laboristaj rondoj. Göteborg (SE), 1924-1934, A3, presita. Red. Einar Adamson. IEMW 705.275-E.Esp. [7166]. Fonto: Enciklopedio de Esperanto, p. 172. Sommer 1925. Speciala numero de la Svenska Arbetar-Esperantisten. Eld. Svenska Arbetar Esperanto-förbundet. Fonto: Heroldo de Esperanto, 1925/52, p. 4.
- 12294. Somogyi Természetbarát.** Naturfreunde. Naturamiko. Kaposvár (HU), 1991, 60 p. 20x14, ilustrita, multobligita, en lingvoj hungara, germana kaj Esperanta. Red. Péter Vukov. [7167].
- 12295. Sonbendservo.** Ĉiumonata sonbenda informilo de nederlandaj blindaj esperantistoj. Prizorgas la multplikadon/eldonas Fondaĵo «Tanna Wilhelmina Bruijnzelstichting», Rotterdam (NL), 1963-1968? Red. s- ro D.E. Schipper. [7168, 8241]. Fonto: Informilo de IEMW, nov. 1965, p. 15; Nederlanda Esperantisto, sept. 1968, p. 69.
- 12296. Sonderdruck aus der Zeitschrift «Germana Esperantisto».** [Aparta presaĵo el gazeto «Germana Esperantisto»]. Berlin (DE), 1906, 2 p. 30x20; 24x18. 2 n-roj. [7169].

12297. **Sonderdruck der Exporttafel des Adressuches von Nürnberg: Ausgabe 1934.** Speciala preso de la Eksportista tabulo en la Nürnbergga adreslibro: Eldono 1934. Nürnberg (DE), 1934, pp. 168-182. Dokumento germana, angla, franca, hispana, itala, Esperanto. IEMW 704.910-C.Esp-1. Ĉu ni aperigu en la 2-a volumo?
12298. **Songazeto.** Eld. Kooperativo Literatura Foiro. Eldonloko nekonata. Almenaŭ 9 sonbendoj, kun variaj dokumentoj, intervjuoj, prelegoj, kantoj, teatraĵoj en Esperanto. Red. Giorgio Silber kaj d-rino Perla Martinelli.
Songazeto, La. ☞ **Sonmagazino. INBE. Songazeto «Najtingalo».** -- vd. **Najtingalo.**
12299. **Songô.** Tokyo (JP), 1934. [7170].
12300. **«Sonmagazino» INBE.** Internacia neŭtrala bulteno Esperntista. Santa Cruz de Tenerife (ES), 1991-1997-? Redaktoroj/prizorgantoj Adam Goralski kaj Krystina Goralski. Jam aperis la 46-a numero de la aŭskultebla revuo redaktata de gesinjoroj Goralski. Daŭre ĝi estas ricevebla per simpla alsendo de nova aŭ uzita kasedo al la prizorgantoj. [7171, 9662]. Fonto: La Eta Gazeto, 1993/9, p. 9.
12301. **Sonne der Wahrheit.** Suno de la Vero. (Bahai.organo). Monata organo de Germana Bahaj. Unuiĝo G.B.U.) Stuttgart (DE), marto 1921-aŭg. 1922 -? Ĉiumonate kelkaj paĝoj en Esperanto. Redaktorino s-ino konsulo Alice Schwartz-Solivo. Fonto: Esperanto Triumfonta, n-ro 89, 1922 -06-18.
12302. **Sonoreto.** Eld. de Internacia Fakoj de Kyoto-Kiboŝa-Federacio. Kyoto (JP), 1932, hektografita. Almenaŭ 2 n-roj. [7172]. Fontoj: Esperanto-Kiboŝa, 1931 sept. p. 23; Heroldo de Esperanto, n-ro 673, p. 1-2.
12303. **Sonorevuo el Jugoslavio.** Sonrevuo. Intervjuas s-ino E[milia] Lapenna. Redaktata de Zravka Metz. Ie en Jugoslavio (YU?), 1978. Fontoj: Recenzita en La Revuo Orienta, 1979/8, p. 241 (18); Meza aldono al La Revuo Orienta, 1979/12, p. 38.
12304. **Sonorilo.** Oficiala dumonata (de 1969 trimonata) bulteno de B.E.F. [Belga Esperantista Federacio]. Brugge (BE), Wilrijk (BE), jan./febr. 1962- nov./dec. 1974, 12- 16 + IV. p. 23x15, presita, ilustrita. En 1964 (59-a jaro) redaktis la organon Maurice Jaumotte, Fernand Roose, Grégoire Maertens kaj Charles Poupeye. IEMW 700.009-C.Esp. GEBAA (1619). [7173]. Antaŭe: Belga Esperantisto.
12305. **Sonorilo.** Eld. LAPEK (Latinamerika Peresperanta Kulturcentro). Hispanlingva organo por Esperanto. Armenia? (CO), 1987-1988. [7175]. Fonto: l' esperanto, 1988/7-8, p. 2.
12306. **Sonorilo! Dulingva organo de Sudkalifornia Esperanto-Asocio.** San Diego (CA, US), nov. 1963, 2 p. A4, tajpita, multobligita. Red. Kenneth Scoff Friedman. [7174].
12307. **Sonorilo de l' Popolo, La.** Anarkista organo. Kanton (CN), Ĉ. en 1922 -1923? «Tiutempe la anarkista movado en Ĉinio eksterordinare kreskis. Ĉie stariĝis grupo kun presorgano...» Fonto: Sennacieca Revuo, okt. 1923, n-ro 1 (43), p. 14. Ĉu la organo estis dulingva?
12308. **Sonorilo Elzasa.** Movada organo dulingva (germana, franca). Mülhausen (DE/FR), febr. 1912-1913, 24 p. 35x24; 28x21, ciklostilita. Red. Jacques Baumann. [7176]. Fonto: La Ondo de Esperanto, 1912/okt. p. 159; Stojan (3815), p. 347; Takács (1109).
12309. **Sonoro, La.** Ie en Japanio (JP), 1948. [7177]. Fonto: La Revuo Orienta, 1948/11, p. 24.

- 12310. Sonrevuo en Esperanto.** Titolvarianto: Sonrevuo. Eld. Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj. [alinome: Blindula Esperanto-Asocio por Kroatio]. Zagreb , (YU/HR), 1978-1980 -? Ĉefred. Marinko Gjivoje, red. Tomislav Kaloviĉ (blindulo). La 3-a n-ro (90-minuta sonbendo) raportas pri rondvojaĝo de Zdravka Metz tra Japanio. Surestas intervjuoj kun pluraj japanaj esperantistoj, inkluzive gejunulojn. La multobligan kaj distribuan laboron (200 ekzempleroj) faris Magnetofona Servo de Universala Esperanto-Asocio (UEA). IEMW 8- KAS.Esp. KAS-008-Esp. [7178, 8684]. Fontoj: L' Esperanto, 1978/7-8, p. 13; La Brita Esperantisto, 1979 Jan.-Febr. p. 213; Esperanto (UEA), apr. 1980, p. 72.
Sonrevuo por nevidantoj. 🗉 **Amika Voĉo.**
- 12311. Sonservo (de NOSOBE).** NOSOBE Sonbenda Servo. [Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj?]. NOSOBE ĉiumonate aperigas sonbendon. Ie en Nederlando (NL), ?- 1970 -? [9663]. Fonto. Komuna Esperanto Gazeto (KEG), 1970, sept. p. 112.
- 12312. SOOEI?/ŜOOEI?.** Ie en Japanio (JP), julio-aŭgusto 1932. [7179]. Fonto: La Revuo Orienta, 1933/2, p. 55; 1932, sept. p.353.
- 12313. Sophia.** Teozofia Revuo. Madrid (ES), nov. 1909-1910, 4 p. 23x16. Red. Michael Cases Martin kaj Julio Garrido. [7180]. Aldono de «Revista Teosofica». Fontoj: Laŭ Germana Esperantisto 1910/2, p. 36. «Teozofia Revuo» estas aldono al «Sophia»; Stojan (3816), p. 347; Takács (1110); Antonio. Marco Botella, „Analoj de la esperanta movado en Hispanujo p. 738.
- 12314. Sorokaba Esperanto Klubo.** Poŝkalendaro 1984. Sorocaba (SP,BR), 1984, 10x7. [7181]. Fonto: «La Lampiro», 1983/okt.-dec. p. 21.
- 12315. Sorokaba Informa Bulteno.** Organo de Sorokaba Esperanto-Klubo. Sorocaba (SP,BR), 1981-1989. Almenaŭ 47 n-roj. [7182]. Poste: Sorokaba Informilo. Fonto: «La Lampiro», n-ro 57, p. 18.
- 12316. Sorokaba Informilo.** Eld. Sorokaba Esperanto-Klubo. Sorocaba (SP,BR). ? -1992 -? [7183]. Antaŭe: Sorokaba Informa Bulteno. Fonto: Ricevis ĝin «Fenikso», 1993/1, p. 10.
- 12317. S. O. S. bulteno/cirkulero.** Internacia S.O.S Bulteno. Monata radiobulteno de Franca Esperanto-Klubo de Radio. Eld. Radio-Club Esperantiste de France. Eld. Norda Franca Federacio Esperantista. Dunkerque (FR), Paris (FR), dec. 1932-1938, 1 -2 p. 35x25, ciklostilita; 4 p. 26x18, presita. 62 n-roj. Red. aŭ programdelegito E. Houzé. IEMW 705.368- C.Esp. [7184, 7185]. Fontoj: Pola Esperantisto, Marto 1938, p. 45; Jarlibro de SAT, 1938, p. 9.
- 12318. SOS-Bulteno.** Radio-Journal Brno. Radiojournal Brno eldonas kaj multobligas laŭ instigo de inĝ. E. Houzé, el Malo-Dunkerque tiel nomatan S.O.S.-bultenon por detala informo pri programoj al la gesamideanoj. (Sciigoj pri venontaj esperantistaj programoj). Brno (CS/CZ), 1933-1935. IEMW 705211-C. En 1934 aperis Almenaŭ 5 n-roj, ili troveblas en IEMW. [8685]. Poste: Ĉeĥoslovaka Radio-Bulteno. Fonto: Ligilo, 1934/5, p. 60.
- 12319. South African Esperantist, The.** Durban (ZA), Natal (ZA), julio 1911-? 21x14. Red. J. Dursart. [7186]. Fontoj: Stojan (3817), p. 348; Takács (1111).
- 12320. Southern Esperantist Federation.** Bulteno. Gosport (GB?), 1932, hektografita. [7187]. Fonto: Heroldo de Esperanto, n-ro 677, p. 2.
- 12321. South Midland Esperanto Federation.** Bulletin. Luton (GB), julio-sept. 1926, 4 + IV p. 20x13, ciklostilita. Tri kajeroj. [7188]. Poste: Bulteno (de la) Sud-Mezlanda Esperantista Federacio. Fonto: Takács (144).

- 12322. Sovaĝa Rozo, La.** Eldono de Amikaro Graneboa «Sovaĝa Rondo». Organo de l' anoj de la Jursla-kursoj. Aperas kaprice. La Cefenhavo estas la klasika radiodramo «Legu aŭ pafu?» Rolas maksimume 3 personoj. La teksto de la dramo estas havebla ĉe familio Szilágyi [Ferenc kaj Róza]. Bona literaturo por kursoj. Boras (SE), dec. 1945-1946, 5 p. A4, multobligita. IEMW 703.419-C.Esp. [7189]. Fonto: Svenska Esperanto-Tidningen, La Espero, 1946 febr. p. 14.
- 12323. Soveta Armenio.** Eld. Armena Societo por Amikeco kaj kulturaj kontaktoj kun Eksteraj Landoj, Esperanto- Komisiono. Erevano (SU/AM), 1973, 32 p. 20x15, presita, ilustrita. Sola n-ro? Aldono al informa bulteno «Armenia Segodnja» [Armenio Hodiaŭ]. IEMW 704.175-B.Esp-008. GEBAA (1498). [7190].
- 12324. Soveta Blankrusio.** PEK-Bulteno de Blankrusia PEK-Centro kaj Blankrusia Radio- Komitato. Minsk (SU/BY), majo 1934, 4 p. presita en 300 ekzempleroj. Almenaŭ 5 n.-roj. IEMW 703.535-B.Esp. [7191]. Fonto: Nova Rondo, n-ro16. Aldono, n-ro 79, p. 5.
